



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 31^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k112/k112.html>

Supreniri postulas forton, malsupreniri, inteligenton, kaj sinteni, arton

Kristnasko kaj aliaj falsajtoj



Fraŭdo de bildeto

Je la fino de la jardeko, komenco de la 20^{aj} jaroj!

N^o 112^a

Januaron 2020

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj
(HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio

Enhavo

Redaktore: Je la fin' de jardek'...	3
Politiko: La fraŭdo de bildetoj....	4
Sezone: Pri Kristnasko.....	5
Literaturo:	
Don' Huan, ĉ. 7 ^a	7
La Faraono, ĉ. 61 ^a	13

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: Johano A. Cabezos.

Redaktas: Jesuo de las Heras.

Korektas: Jozefo Pina.

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj,
kvankam ni klopodos publikigi ĉiun
artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies
enhavo mistraktas nenium personon.

Oni povas reprodukti la enhavon,
kondiĉe, ke oni citu la originon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.

Kovrilo: Humura filmo *Los tramposos* (la trompuloj),
kiun Pedro Lazaga faris je 1959, aktorigita de Toni
Leblank, inter aliaj, bildigas la nunan situacion de
Hispanio, tute trompataj de nedemokrataj politikistoj.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €5
jare por ricevi la surpaperan version de nia
magazino. Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.


Konto **ES30 2100 4617 4122 0011 5275.**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la
menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la
surpaperan version.

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj:
Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.



Nesubskribi-
tajn artikolojn
verkis la re-
daktoro.


Je la fino de la jardeko

Jen ni denove je la komenco de la lasta jaro de la dua deko de la jarcento. Ni jam komencas la dudekajn jarojn komenconte la trian jardekon, kaj Esperanto stagnas same kiel antaŭe. Kelkaj samideanoj furore asertas, ke ankoraŭ Esperanto venkos, kaj tio okazos baldaŭ.

Bedaŭrinde, mi ne vidas kiel, eĉ kial, nia lingvo devas **venki** ion. Sukcesas homo, kiam li aŭ ŝi lernas praktiki nian lingvon, ĉar tio ebligas interkonatiĝon kiun homoj de aliaj kulturoj kaj lingvoj. Jen ĉio atingebla. La mondo ĝenerale vidas en Esperanto ion necesan, *kiu perdis la trajnon iam*,

kaj kiun nur ĉirkaŭ cent mil homoj parolas en la mondo. Ŝajnas, ke oni komparas tiun ciferon kun gravaj, larĝe parolataj lingvoj el la mondo, kiel la hispana, la angla, la rusa..., sed la komparo ne estas ĝusta, same kiel ne estas ĝuste kompari violonon kaj gramofonon...

Sed ni vidu, ke se oni lernus amase Esperanton, tio estus bona por la amaso, ne por Esperanto. Ĉar Esperanto estas neniu. Ĝi estas kaj estos same kiel ĝi estis: ilo por interkompreniĝo: nek pli, nek malpli.



Pri politiko, Hispanio estas pli malbone ol tio, kion mi povas memori. Ni havas almozan registaron, kiu lamas peti apogon parlamentan de etaj partioj kiuj ne volas esti hispanaj. Ni komencas la fino de la jardekon ne sciante ĉu ni havas registaron, kaj se ni finfine havas ĝin, certe ĝi lamos pri baza afero, kiel la integriĝo landa. Ĉu ni devas zorgi pri tio? Estas nur unu partio politika, kiu ne toleras, ke nia suvereneco estu regata de Eŭropo, kaj tiun partion oni fifamigas kiel ekstremodekstra, dum la aliajn oni konsideras demokrataj, eĉ se ili ne defendas la rajtojn de la nacio kaj civitanoj esti sendependaj kaj aserti niajn tradiciojn kaj kulturon kontraŭ globigo kaj Politiko Korektisma. Esperu ni, ke en la ĵusa estonto tion oni solvos, eĉ se mi forte dubas pri tio, ĉar tio, kio ne funkcias estas la politika reĝimo, kiun ni ankoraŭ suferas. Ni bezonas novan Konstitucion por ke tio ĉi ne plu okazos.

Laste enmodiĝis deksejara knabino, Greta Thunberg, kiel ikono pri kontraŭvarmigo globa, kaj multaj adeptoj al tiu sinteno kulpas nin mem, homojn, pro tio, ke ni detruas la mondon. Ni diskutos la aferon en niaj paĝoj.

Mi mem opinias, ke la afero ne estas tiom grava, kaj ankoraŭ mi povas deziri al vi Feliĉan Novjaron!

Socio

Fraŭdo de bildet'

Imagu la bildon: ŝajna mallertulo plendas al vi, ke li trovis sakon plenan de *bildetoj*, kiun li volas vendi, ĉar ili estas ripetitaj. Vi vidas, tamen, ke tio, kion li nomas bildetoj, estas biletoj po €100. Kion vi farus? Vi scias, ke se vi ne profitas la okazon, alia homo tion faros, do la tento aĉeti tiujn bildetojn estas granda, ĉu ne? Poste vi vidas, ke la biletoj estas falsaj, kaj aldone estas nur blankaj paperoj sub la unua vico da bildetoj. Sed kiam vi serĉas la mallertulon, li jam estas for, kaj neniu ŝajnas koni lin...



La fraŭdo de la bildeto, majstre aktorigita de Toni Leblank en filmo *La trompuloj*, de Pedro Lazaga je

Nu, tio ŝajnas okazi inter ni. Ne celas diri mi ni, hispanoj, sed ni, eŭropanoj. Ni revas vivi en demokratio, sed tio estas fremda realo al ni, eĉ se oni adoras la koncepton en Eŭropo. Ni forlasu la nubon, en kiu ni ŝajnas vivi, kaj juĝu faktojn, ne ideojn aŭ ideologiojn: kiu lando eŭropa elektas siajn gvidantojn? Verŝajne en Francio oni elektas la Prezidenton rekte. Bone por francoj; sed ĉu ili elektas la anojn de sia parlamento, aŭ ĉu ili nur voĉdonas por tiuj, kiujn la koncernaj partioj elektas antaŭe? Ne, vere, tio okazas nur en Britio. Tamen, en Britio oni ne elektas la Kapon de la Ŝtato, kiu estas la Reĝino. Ankaŭ ili ne elektas la Ĉefministron, sed Parlamento tion faras. Ĉar la parlamentanoj elektas la Ĉefministron, li aŭ ŝi devas respondecigi antaŭ la parlamentanoj, kaj sekve li neniel estas sendependa aŭtoritato. Pro tio en ambaŭ du plej proksimaj landoj al demokratio, tio ne ekzistas.

Kaj kio pri Hispanio? Ĉi tie ni havas ambaŭ malavantaĝojn: ni ne elektas la parlamentanojn, ĉar politikaj partioj faras tion por ni, kaj restas al ni nur la eblecon voĉdoni por tuta, fermita listo da kandidatoj, kiujn partioj politikaj kreis, same kiel francoj faras. Sed la Prezidenton de la Registaro ni ankaŭ ne elektas, ĉar tion faras parlamentanoj anstataŭ ni. Ĉu vi pretas ludi kiam la posedanto de la kartaro trukas favore al tiuj, kiujn ni ne konas?

Evidentiĝas, ke oni avertas al ni, ke estas sako plena da bildetoj brilaj, demokratio, kaj emigas nin aĉeti tion per nia voĉdono, sed poste ni plendas pri tio, ke tiuj voĉdonituloj rabas ĉiam, kiam ili povas, favore al sia partio aŭ al si mem, kaj eĉ se ili ne rabas, ili ne povas agi favore al ni, ĉar ili devas obei la ordonojn de sia partiestro ne esti punitaj aŭ eksigitaj de la partio kaj parlamento, kie oni tiom facile kaptas monon de sia ega salajro.

Sed partioj en Hispanio kontrolas la amasmediajn komunikilojn, kaj per ili

ankaŭ kreas kaj kontrolas la opinion publikan, kiu jam koincidas kun la publikigita opinio, ĉar neniu volas kontraŭi ĝin. Sekve ni ĉiuj jam parolas favore al Klimatŝanĝo, kaj akceptis, ke deksejaraĝa knabino estas moderna heroino, kiu akre batalas kontraŭ la klimatsanĝo kaj ties kulpuloj, ni mem, kiuj uzas plastikon kaj aŭtomobilon, kaj ankaŭ elektriĝo kaj eĉ saponon senbezone... Sed kiu decidas, kio estas bezonata, kio ne? Kie kuŝas la korekta limo por nia kutima vivo, laŭ Politiko Korekta? Ĉu nur mi vidas, ke tio estas netolerebla agreso kontraŭ intimeco nia? Oni diras, ke niaj etaj malobservoj de la komuna afero nia, nia planedo, ne estas intima vivo respektbla.

Sekve, ne aĉetua bildetojn. Ne voĉdonu.

Sezone **Pri Kristnasko kaj aliaj falsaĵoj**

Oni ŝajnas kredi ĉe Okcidenta Mondo, ke JesuoKristo naskiĝis la 24an de decembro, kaj la venantan tagon oni festumas la naskiĝotagon de la Filo de Dio, kaj ke, aldone, la sesan de januaro estas la tago, kiam Moŝtaj Reĝoj Magaj de Oriento (kriptece akronimigitaj hispane al RRMM) finfine trovis la Sanktan Bebon kaj plenigis lin per donacoj, post ili demandis erare fian Herodon Antipas', kies timo perdi sian kronon igis lin organizi amasbuĉado de infanoj aĝaj same kiel la Redemptoro suben, tiel ke restos neniu Mesio ebla, kiu poste forprenis lian tronon, kronon kaj vivon. Tial Sankta Jozefo, supozita patro de la minorulo, prenis sian familion en Egipton ĝis la danĝero foriris, kaj la RRMM estis avertitaj de anĝelo reiri per alia vojo, tiel ke la Reĝo de la Judoj ne igos ilin konfesi kie la estonta reĝsopiranto loĝas.

Iuj povas pensi, ke mi ne traktas la temon sufiĉe serioze, kaj se iu sentas sin ofendata, estus pli bone por li aŭ ŝi ne plu legi, se la grado da toleremo ne estas sufiĉe alta, ĝis la punkto respekti la opiniojn de homo, kiu ne havas alian dogmon krom pensi, ke ĉi tiu vivo iam finos, por bono aŭ malbono... Mi avertas, ke tiujn temojn mi ŝatas trakti objektivaj kaj mi klopodas aserti nenion, kiun mi ne povas pruvi, kaj ke semi dubon estas simile al helpi homojn pensi per si mem.

Kiel sciante, Kristanismo estis fondita en Izraelando de dekunu galileoj kaj unu judo, kvankam poste anatolo konvertita al tiu nova religio, Saŭlo de Tarso organizis la aferon. La judo nomiĝis Judo Iskarjote, kaj la galileoj estis Simon' Petro, Andreo (lia frato), Jakvo kaj Johano Zebedo (la evangeliisto), Mateo Levi' (alia evangeliisto), Jakvo kaj Judo Alfeo, Filipo. Bartolomeo, Tomas', kaj Simon' de Kanao. Ni ankaŭ scias, ke la judo preskaŭ ne intervenis, ĉar lia seniluziigo kaj perfido irigis lin en memmortigon, kaj li estis anstataŭata de Matio (Matías, etimologie *La donaco de Dio*). Diferenco

inter galileoj kaj judoj gravas, ĉar la unuaj estis multe pli toleremaj pri religia praktikado, kio ne malebligis, ke ambaŭ ili estis masklistaj kaj rasismaj, kiel estis kutimo en tiu societo: Dio elektis la popolon de Izraelo, kaj sekve la aliaj homoj estas skvamo, kiu iam estos mastrumataj aŭ forviŝitaj de la suro de la Tero, kiam venos Mesio, kiu organizos la Reĝlando kaj forprenos romianojn en la maron kaj daŭrigos la konkeran militon ĝis la okupacio de la sepdekaj landoj, el kiuj tiam oni kredis, ke la mondo konsistas. Pri masklismo, oni deduktas tion el la fakto ke, malgraŭ tio, kion oni vidas en filmo tre plibonigebla, kiun ni ĵuse vidis en niaj kinoteatroj kaj kiun oni povas ĝui en Amazon Prime, **Mario Magdala**, ĉiuj apostoloj estis viroj. Virinoj en tiu socio antaŭ 21 jarcentoj, estis proprajoj de siaj patroj aŭ edzoj, kaj se ili vidviniĝis, kiel la Patrino de Dio, estis subigitaj al siaj unuaj virfiloj (senrigardante al filinoj pli aĝaj ol filoj, oni komprenu). Tial Mario ne komprenis, ke sia filo lasis tiun respondecon favore al sia frato Jakvo.

Diable, ŝajnas, ke ni kolizias kun dogmo... Jes, ŝajnas ke Sia Moŝto la Papo Paŭlo 4^a proklamis la 7an de aŭgusto de 1555 la dogmon pri virgeco de Mario, kiun de tiam oni konas kiel *La Virgulino Mario*, aŭ simple *La Virgulino*. Estas tio vero kredenda de ĉiu kristiano de tiu tago, kvankam antaŭ tiam kelkaj verkistoj pli-malpli sanktaj, kiel Origeno, jam diris tion. Oni ne scias el kio ili baziĝis, sed ni, kiuj ne estas kristanoj, trovas malfacile kredi ke, se, pro iu mistika kialo nekomprenebla al homa menso, estus vera, ke la Sankta Spirito fekundigis Virgulinon Marion, je la momento de nasko ja piedsignis viro, Jesuo mem, la korpon de sia patrino elirante per la natura malfermaĵo, se oni ne pruvos, ke tio estis pro cesareo, kutima praktiko inter romianoj de la naskiĝo de tiu, al kiu oni aljuĝas la nomon, Julio Cezaro...

Nu, revenante al nia kristnaska temo, ŝajnas malmulte eble, ke Jesuo naskiĝis la 24an de decembro, ĉar tiunokte, laŭ **La Sanktaj Skribaĵoj** (vulgare nomita **La Sankta Biblio**), koruso de anĝeloj aperis al ŝafistoj, kiuj dormis subĉiele. Proksime de Belhemo, la monaton de decembro estas memmortiga tempo dormi subĉiele kun temperaturoj najbaraj al nula grado. Kiel, sekve, oni decidis, ke la grava evento de naskiĝo de Infano Dio okazis ekzakte la 24an de decembro? Kompreni tion devigas konsideri iom da historio:

Ni scias, ke Aleksandro Magna liberigis judojn de la subpremado de persoj je la jarcento 4^a antaŭ la naskiĝo de la Dia Infano, sed post la morto de Aleksandro, komencis en Izraelio nova dinastio, greka, tiu de Seleŭcidoj. Estis militoj, kaj Makabeoj finfine venkis ilin du jarcentojn poste. Tiun venkon oni festumas, de tiam, la 24an de decembro, kaj daŭras naŭ tagojn ĉar kandelingo kun nafto por nur unu tago lumis tiam dum tiom da tagoj. Kion faris kristanoj ĉesi festumi tiun judisman feston? Nu, ŝanĝi la nomon, alproprigi pri ĝi kaj nomumi ĝin **Noktobona**, kaj la sekvantan tagon, deklarita festo, **Kristnasko** honori la ĝojon pri tio, ke la Infano Dio naskiĝis ekzakte jarojn kaj unu tagon antaŭe.

Nu, ververe tiun tagon ankaŭ prenintis romianoj, kiuj festumis la 25^{an} de decembro la naskiĝon de **Sol Invictus**, la Suno Venkanta, ĉar ili konsideris, ke de tiu tago la horoj sunaj kreskas post atingi la minumon da sunhoroj je solstico vintra. Pro tio anstataŭ nuligi la festumon de la suno, ili rebaptis ĝin, kaj daŭre ili festumas, ĉar kio estas pli sankta kaj luma ol la naskiĝo de la Filo de Dio, la antaŭ vesperon? Ni ĝoju, ni manĝu kaj trinku, ĉar Dio jam naskiĝis!

Sed eble oni demandas, kiam naskiĝis Jesuo? Pri tiu dato estas diversaj teorioj kaj spekuloj, sed mi emas adopti tiun de J. J. Benítez: la 21^{an} de aŭgusto, favore al ŝafistetoj salutitaj de la anĝela koruso per **Bona Novaĵo...**

Je malnova Babilono, multajn jarojn antaŭe, oni festumis la venkon de Suno kontraŭ Mallumo la 6^{an} de januaro, ĉar ili kredis, ke tiu estis la tago, kiu sekvas la plej mallongan tagon de la jaro. Eble ambaŭ tradicioj pravas, ĉar estis ŝanĝoj en kalendaro inter ambaŭ momentoj de historio. Sed estas strange, ke nur en Hispanio oni celebras la festumo de Iliaj Moŝtaj Reĝoj.

Kiel oni vidas, en tiuj ĉi kristnaskaj festoj nenio veras, nenio malveras. Ĉio estas heredita. Aŭ prunteprenita, kio estas same. Eĉ la ideo mem pri Mesio. Vere Mesio estus tiu, kiu forpelus romianojn en la maron, kaj poste prenis la ceteron de la mondo. Anstataŭe, Jesuo de Nazaret' permesis sin esti mortigita de ili, kaj per tio li asertis la mesaĝon pri amo, pri tio, ke oni amu la malamikon. Kaj per tiu mesaĝo li prenis la tutan imperion kaj poste la ceteran mondon pere de alia imperio, la Hispana Imperio, kiu prenis tiun mesaĝon kaj civilizacio devenita de ĝi en la Novan Kontinenton, kaj de tiu al ceteraj, kie ĝi vivas ĝis niaj tagoj, pli ol du mil jaroj poste.

Sed mi rakontos tion alian tagon. Nune sufiĉas al mi deziri al vi ĉiuj feliĉan 2019^{an} Kristnaskon kaj belan novjaron 2020^{an}. Kaj pardonu vi pro la misdatumo kaj misnomigo de la festoj. Sed vi jam scias: temas pri la kutimo.

*La misaventuroj
de Don' Hŭan'*

7 Ŝanĝante etoson

Sed tuj enirinte la hotelon li komencis trovi ekzotajn knabinojn. Ili sekzotis al li, sed ankaŭ li ekzotis al ili. Do, li sentis sin altirita al ŝi, kaj ili estis feliĉaj paroli al li. Tio iris bone dum kelkaj tagoj, kaj ankaŭ la knabinoj, kiujn li konis ĉe la hotelo laboras tie. Ili devis esti ĝentilaj al klientoj, sed nenio pli.

Alia rakonto okazis pri Gerturdo. Li konis ŝin en la Parko Grosser Tiergarten. Ŝi manĝigas kolombojn. Li diris al ŝi, ke temas pri agrablaj bestoj, kiuj povas flugi. Poste ili du iris por kafo kune, kaj baldaŭ Gertrudo estis en lia hotela ĉambro. Ŝi pasigis tie du horojn, kaj poste ŝi devis reiri hejmen. Li ne demandis, ĉu li devas reiri al edzo, patro, aŭ filo..., fakte tio ne estas lia afero.

Ne estis surprizo, ke ĵus elirinte ŝi, Don' Hŭan sentis malpeziĝo. Li subite memoris kial li estis tie: jes, ĝui la plezuron liberiĝi el virinoj provizore.

Sekve, li pagis kaj forlasis la ĉambron en sia hotelo kaj iris en la Stacidomon. Post nur kelkaj horoj li estis en Parizo, aŭ almenaŭ tiel ŝajnis al li ĉar li ĝuis la vojaĝon tiom multe. Kompreneble, tial la vojaĝo estis tiom mallonga por li. Li estis ĝuonta la belaĵojn de unu el la plej malnovaj urboj de Eŭropo, aŭ tiel li konjektis pro la fakto, ke li ne povis kompreni la francan, kio estas bona baro inter li kaj virinoj en Francio. Jes, francinoj estas agrablaj, sed li ne povas paroli aŭ kompreni ilin. Kaj tio estas bona ŝanĝo en lia vivo. Diversa lingvo donos al li, li esperis, la ŝancon esti nevidebla de virinoj!

Li pensis tiel ĉar li ne konsideris la fakton, ke Parizo ne nur estas la ĉefurbo de Francio, sed unu el la ĉefaj urboj de la mondo. Kaj tie li konis usonaninon Barbarinon, virino kun nur unu difekto: ŝi havas edzon, eĉ se li estas en Usono tiumomente.

Barbarin' ne estas ekzakte bela, ĉar je la mezo de ŝia vizaĝo estas granda nazo, kiu ŝajnas aĝle. Tamen, tiu nazo provizas ŝin apartan originalecon. Siaj okuloj estas viglaj kaj ŝi havas altiran manieron paroli. Tio donas al ŝi gravan personecon kaj igas ŝin notinda kiel virino, vere. Ŝi estas iomete malpli alta ol li, kaj ŝi decidis, tuj vidante lin, ke tiu masklo estos sia sengrave al la kosto.

Tamen, Don' havis aliajn planojn.

«Ĉu vi drinkos kun mi, junulo?», Ŝi demandis.

«Kompreneble, sinjorino», venis lia tuja respondo. Ŝi ne altiris lin aparte, kvankam plaĉis al li la fortan personecon de la sinjorino.

«Mi estas Don' Hŭan', sinjorino. Fakte Donato Hŭan', sed geamikoj nomas min Don'».

«Barbara McCallister, sed vi povas nomi min Barb', Don'».

«Konsentite, Barb'. Pardonu, sed vi inspiras al mi tro multe da respekto por ke mi vokos vin tiel»

Ŝia karaktero estas tre forta. Ŝi vere scias pri tio, kion ŝi volas, sed ŝi eraris pri Don': lian ĝentilecon ŝi miskoprenis kiel malfortecon..., kaj kiam li rifuzetis sekson kun ŝi, sentis ŝi malbonfarton.

«Ĉu vi ne ŝatas min?», ŝi demandis kun surprizo.

«Kompreneble jes, Barbarin'».

«Sekve?»

«Mi ne ŝatas, ke sinjorinoj regos mian tempon. Kial vi ne akceptas tion? Mi venis ĉi tie ripozi. MI kredas, ke ĉinokte oni prezentas Don Giovanni ĉe Palaco de Opero. Ĉu plaĉus al vi vidi ĝin kun mi?»

«Ĉu opero? Bone, vi estas tre stranga viro, Don'. Jes, kial ne? Mi ne sciis, ke vi estas tiom klera».

«Bone, fakte mi ne estas, sed mi ŝatas muzikon kaj la plej bona mondumo de Parizo estos tie».

«Kaj? Ĉu vi volas esti inter la plej gravaj homoj, la Grandaj Fiŝoj de Parizo?»

«Ne, sed mi sentas, ke mi trovis min grava kiam mi estos tie, je la mezo de la Kulturo Eŭropa».

«Bone, povus estis interese vidi la kostumojn de la gravaj knabinoj de Francio. Jes, la spektaklo povas estis je ambaŭ flankoj de la kurteno».

Ili iris al la fama Domo de Opero de Parizo, unu el la plej bonaj el la mondo. La opero estis fakte teatraĵo en kiu ne ĉiuj roloj parolis, sed ili kantis la tutan tempon. La muzikon komponis W. A. Mozart' nur tri jarojn antaŭ li mortis, ankoraŭ juna, kaj ĝi estis aparte grava al Don' Hŭan', ĉar la nomo de la ĉefrolo similas al tiu lia mem: Don' Giovanni en la itala lingvo estas Don' Hŭan' en la hispana, kvankam ne estas rilato inter ili du nomoj. Kiam li estis en lernejo li legis anglan tradukon de la teatraĵo **Don Juan Tenorio** (verkita de José Zorilla), laŭ konsilo de sia patro, kaj poste, vizitante Toledon (Hispanio) viziti la patrinon de sia patro, li havis la ŝancon vidi la originalan teatraĵon en Teatro Rojas, en la hispana lingvo. Tiam li trovis, ke estas universala argumento, kaj li esperis, ke la opero estu ekzakta kopio e tiu teatraĵo, sed li trovis gravajn diferencojn. Ankaŭ evidentiĝis al li, ke la ĉefrolo komplikiĝis kun virinoj eĉ se li ne ĉiam volis, ne ĉiam. Pro tio li konstatis, ke li estis sekure fore de amba Donoj Hŭanoj: Don Giovanni kaj Tenorio persekutis virinojn kaj konvinkis ilin kuŝi kun ili, kvankam li mem, Don' Hŭan' estis

persekutata de virinoj. Ankaŭ' Don Giovanni kaj Tenorio estis malbonuloj, kiuj ne zorgis pri virinoj, kiuj amis ilin, dum li estis tre ĝentila al siaj amikinoj kaj suferis kun ili. Je la fino de la opero Don Giovanni iras inferen, kaj Tenorio fine pentas kaj iras ĉielen danke al la larmoj kaj preĝoj de Doña Inés, dum vivo estis infera por li por li mem, don' Ĥŭan', kiu esperas, ke ĝi meritas la penon vivi, aŭ almenaŭ trovi paradizon post sia tragika vivo ĉi tie, ĉar li pagas tiom grave per aflikto pri la mortoj de Zara' kaj la patro de Anin', kaj la timo, kiun li spertis pro la ĵaluzo de la edzo de Ŝerlin', kaj kiu scias kion pli la destino pretigis por li? Li estas ankoraŭ juna kaj virinoj ne donas al li pacon. Lia mensa malpaco, aflikto kaj timo estas grava puno, kiun li pagas en tiu ĉi infera vivo sia; do, estus juste, ke li ĝuos feliĉon en Ĉielo, kie li povos plendi al Dio pro la mizera vivo, kiun virinoj donis al li de kiam li povas memori, eĉ de unuagrada lernejo, kiam admonis lin lia instruistino kaj poste lia patro pro tio, ke li kisis kunantinon en ŝian buŝon per la sama maniero, per kiu li vidis paĉjo kisi panjon hejme.

Post tiu opero Don' Ĥŭan' akopanis tiun sinjorinon Barbarinon al ŝia ĉambro, kaj tie ŝi invitis lin al glaso de viskio. Poste li kisis ŝian manon deziri ŝin bonan nokton, sed ŝi kisis lin ne ekzakte en lia mano. Ŝi malvestigis lin kaj kisis lin ĉie ajn. Ŝi ankoraŭ vestas la kostumon, kiun li havis en la operdomo, sed subite ŝi faligis ĝin sur la plankon. Ŝi ne havis mamzonon, sed ŝia tangao estas roza, kaj ŝi forprenis ŝin antaŭ Don' povis agi iel ajn.

«Nun je la afero», ŝi diris.

«Se vi certas», Don' diris. Ili seksumis dum horoj, kaj poste ŝi demandis:

«Ĉu vi uzas Viagron aŭ similan?»

«Ne. Kial?»

«Mi neniam vidis viron, kiu daŭris tiom multe...»

«Nu, tio povas esti ĉar mi ne havis sekson dum longa tempo...»

«Ĉu kelkaj jaroj?»

«Du-tri semajnoj».

«Ne! Ĉu tio estas tro longe por vi?»

«Nu, jes».

«Mi ne havis sekson dum ses monatoj, Don' Hŭan'».

«Sed vi estas edzino».

«Tial ekzakte».

«Kaj via edzo, sekve...»

«Ho, li estas tro okupata, tro laca, aŭ tro tedita amori min».

Don' Hŭan' sentis kompaton al tiu teksana virino, kiu ne estis Miss Mondo, sed ankaŭ ne la sorĉistino de Blanka Neĝulino, eĉ se ŝia nazo estas tiom granda. Tamen ŝia estas bela granda nazo. Li scias, ke ŝi sentas malbone pri ĝi, do li kisis ĝin ree.

«Neniam liberiĝu pri tio ĉi», li diris. «Mi amas tiun ĉi nazon».

«Ĉu? Mi havos ĝin malprigandigita baldaŭ».

«Kial? Mi ne certas, ke mi ŝatos vin sen tia nazo, Barbarin'. Ĝi personecigas vin»

«Ho, neniuj diris ton al mi antaŭe. Mi esperas, ke mi estas io pli ol granda nazo».

«Kompreneble vi pravas, karulino. Sed tiu estas via nazo, kaj mi ŝatas ĝin».

«Bonorde, mi konservos ĝin por vi tiom longe kiel vi deziros».

«Mi volos ĝin dum mi volos vin, karulino. Sed tio dependas el vi, ankaŭ».

«Kion vi celas diri?»

«Nu, se vi ne volas esti kun mi, mi ne povas esti kun vi».

«La viro, kiu ŝatas mian nazon kaj donas al mi la sekson, kiun vi donas al mi, povas havi min tiom longe kiel li volos».

«Nu, Barbarin' kara, mi ne scias kiom multe vi celas diri tion».

Ŝi ridetis, eliris la liton kaj surgenuis antaŭ li kaj diris:

«Restu kun mi, mia sinjoro. Mi estos via humila sklavino. Mi promesas»

Don' Hŭan' ekrigardis al ŝi kun surprizo. Poste li ridetis kaj laŭte ridis. Tio surprizis ŝin, sed poste ŝi ridetis dum siaj vangoj ruĝiĝas, kaj respondis:

«Ĉu tio estas jeso, mia sinjoro?»

Li tiris ŝian hararon proksimigi ŝian buŝon al tiu ŝia kaj kisis ŝin tre dure, kaj poste amindumis ŝin sur la planko.

Post du horoj, li diris:

«Bonorde, Barbin', mi kredas, ke mi translokiĝos ĉi tien kun vi. Ĉu tio bonordas al vi?»

«Kompreneble, Don' Hŭan'! Estas agrable havi iun, kiu zorgos pri mi. Estos bona ŝanĝo estinte tiom sola dum tiom longe».

Do dum ŝi duŝiĝis, li iris malsupren, forlasis sian ĉambron kaj revenis en ŝian kun sia bagaĝo. Ŝi legas libron kiam li venis en la ĉambron, havinte li ŝian ŝlosilon. Elirinte, li diris «Ne foriru», do ŝi atendis lin.

«Ho, vi revestiĝis», li komentis.

Ŝi respondis malvestante sin denove, tute.

«Mi kredis, ke vi havis sufiĉe», ŝi diris tiam.

«Jes, sed mi preferas vin nuda».

«Tiam vi havos min tiel dum ni estos kune private, aŭ publike, se vi deziras tion», ŝi diris klinante sin iomete. «Per kiu alia maniero mi povas plezuri vin?»

«Nu, tiu ŝerco jam daŭris sufiĉe, karulino».

«Mi ne ŝercas, Don'. Mi faros ĉion ajn, kion vi volos.

Li pensis, ke ŝi estas denaska ŝercemulino.

«Bone. Staru sur viaj manoj, sekve».

Ŝi provis, sed ŝi falis dufoje. Ŝia tria provo estis sukcesa, tamen, sed evidentiĝis, ke estis malfacile por ŝi daŭrigi tion. Pro tio li prenis ŝiajn krurojn kaj prenis ŝin al lito kaj ĵetis ŝin sur ĝin. Ŝi turniĝis, rigardis al li kaj ridetis: «Iom da krudeco estas eskcitiga, mia sinjor'. Dankon».

«Mi ne scias kial mi faris tion, Barbarin'. Estis instinkto, mi supozas. Ŝajnas, ke plaĉas al vi ĉio el mi. Neniu agis tiel antaŭe, Barbi'».

«Dankon, mia Sinjor'».

«Kial dankon?»

«Doni al mi novan nomon. Mi ne permesos, ke alia persono vokos min tiel. Nur vi povas voki min tiel, mia Sinjor' Mi estas honorigita vere de ĝi».

«Bonorde», li diris. Li ne vere scias kion fari kun tiu mezaĝa, svelta virino. Ŝi vere estas seksaltira, kaj li ekemis perdiĝi kun ŝi en loko, kie neniu trovos ilin.

«Barbi', mi volas iri kun vi tien, kie neniu trovos nin, kaj resti tie por ĉiam kun vi».

«Mi havas domon en Connecticut', mia Sinjor'. Ni povos esti tie morgaŭ».

Daŭrigota

La Faraono

Ĉapitro 61^a

Dume Pentuer sin preparis por reveni de Malsupra Egipto. Unuflanke li devis trovi po dek tri reprezentantojn de l' kamparanoj kaj metiistoj, kiel li promesis al la nova monarĥo. Laŭ lia opinio, la plej grava afero por Egipto estis: forigi la maljustaĵojn kaj trouzojn, kiujn suferis la laborantaj klasoj.

Tamen Pentuer estis pastro kaj li ne nur ne deziris la falon de sia propra klaso, sed eĉ ne volis disŝiri la ligilojn, kiuj kunigis lin kun ĝi.

Por montri sian fidelecon, Pentuer iris adiaŭi Herhoron.

La altrangulo, iam potenca, akceptis lin kun rideto.

– Malofta gasto... malofta gasto..! – ekkriis Herhor. – De l' tempo, kiam vi povis fariĝi konsilisto de Lia Santeco, vi ne montras vin al mi... Verdire, ne vi sola..! Sed, kio ajn okazos, mi ne forgesos viajn servojn, eĉ se vi ankoraŭ pli evitos min.

– Mi ne estas konsilisto de nia sinjoro, mi ne evitas Vian Ekscelencon, al kies favoro mi ŝuldas tion, kio mi estas nun... – respondis Pentuer.

– Mi scias, mi scias! – interrompis Herhor. – Vi ne akceptis la altan oficon, por ne labori por la pereco de la temploj. Mi scias, ke vi ne fariĝis konsilisto de ĉi tiu junulaĉo, simila al petola ĉevalo, kiu, kiel oni diras, regas nin... Sendube vi ne permesus al li sin ĉirkaŭi per perfiduloj, kiuj pereigos lin...

Pentuer, ne dezirante paroli pri tiel danĝeraj aferoj, rakontis al Herhor, por kio li veturas en Malsupran Egipton.

– Bone – respondis Herhor – Ramzes XIII konvoku kunsidon de ĉiuj klasoj... Li havas la rajton... Sed – aldonis li subite – mi bedaŭras, ke vi miksas vin je tio... Grandaj ŝanĝoj fariĝis en vi! Ĉu vi memoras, kion vi diris dum la manovroj apud Pi-Bailos, al mia adjutanto..? Mi rememorigas al vi: vi diris, ke oni devas limigi la trouzojn kaj la diboĉojn de la Faraonoj. Kaj hodiaŭ... vi mem subtenas la infanajn pretendojn de la plej granda diboĉulo, kiun iam ajn havis Egipto.

– Ramzes XIII – interrompis Pentuer – volas plibonigi la sorton de la popolo. Mi do estus, malsaĝa kaj mizera, se mi, filo de kamparanoj, ne servus al li en ĉi tiu afero.

– Sed vi ne demandas, ĉu vi ne malutilos nin, la pastraron..?

Pentuer ekmiris.

- Vi ja mem plibonigis la sorton de la kamparanoj, apartenantaj al la temploj!
–ekkriis li. –Cetere mi havas vian permeson...
- Kion..? kian..? –demandis Herhor.
- Rememorigu al vi via ekscelenco la nokton, dum kiu, en la templo de Set, ni akceptis Beroeson. Mefres diris tiam, ke Egipto falis de la malleviĝo de la pastraro, mi certigis, ke la mizero de la popolo estas la kaŭzo de la malfeliĉo de l' ŝtato. Al tio, se la memoro ne trompas min, vi respondis: "Mefres zorgu pri la releviĝo de la pastraro, Pentuer pri la plibonigo de la sorto de l' kamparanoj... Kaj mi antaŭzorge malhelpos la militon inter Egipto kaj Asirio."
- Vi vidas do –interrompis la ĉefpastro –ke vi havas la devon agi kun ni, ne kun Ramzes.
- Ĉu li volas militon kontraŭ Asirio..? –respondis energie Pentuer. –Aŭ eble li malhelpas la pastrojn akiri saĝon..? Li volas doni al la popolo ripozon ĉiun sepan tagon, kaj poste donaci al ĉiu kamparana familio pecon da tero... Kaj via ekscelenco ne diru al mi, ke la Faraono volas ion malbonan, ĉar oni konstatis en la bienoj de l' pastroj, ke kamparano libera kaj posedanta sian kampon laboras pli bone ol sklavo.
- Mi tute ne kontraŭstaras la reformojn por la popolo! –ekkriis Herhor. –Sed mi estas certa, ke Ramzes faros nenion por la popolo.
- Sendube nenion, se vi rifuzos monon...
- Eĉ se oni donus al li unu piramidon da oro kaj arĝento, kaj duan de juveloj, li faros nenion, ĉar li estas petolema bubo, kiun la asiria ambasadoro Sargon neniam nomis alie, ol "flavbekulo"...
- La Faraono havas grandajn kapablojn...
- Sed li scias nenion, li konas nenion..! –diris Herhor. –Li apenaŭ metis la piedon en la superan lernejon, el kiu li plej rapide forkuris. Kaj tial hodiaŭ en la aferoj de la regado li estas kvazaŭ blindulo, kvazaŭ infano, kiu kuraĝe dismetas la damojn, sed tute ne scias ludi ilin.
- Tamen li regas...
- Ĉu tio estas regado, Pentuer! –respondis la ĉefpastro kun rideto. –Li fondis novajn militajn lernejojn, pligrandigis la kvanton de la regimentoj, armas la tutan popolon, promesas festojn al la popolaĉo... Sed kiel li plenumos tion..? Vi restas malproksime de li, vi do scias nenion; sed mi certigas al vi, ke li donante la ordonojn, tute ne konsideras, kiu plenumos ilin? kiel? kiajn sekvojn ili havos? Al vi ŝajnas, ke li regas. Tio estas mi, kiu regas, mi seninterrompe regas, mi,

kiun li forpelis de si... Mi estas la kaŭzo, ke hodiaŭ malpli da impostoj alfluas al la trezorejo, sed tio estas ankaŭ mi, kiu malhelpas la ribelojn de la kamparanoj, kiuj jam eksplodintus; dank' al mi ili ne forlasas la laborojn ĉe la kanaloj, akvobaroj kaj ŝoseoj. Fine, mi jam dufoje detenis Asirion, kiu volis proklami militon kontraŭ ni, kiun ĉi tiu frenezulo provokas per siaj militaj preparoj... Ramzes regas..! Li nur faras malordon. Vi havis provon de lia mastrumado en Malsupra Egipto: li trinkis, diboĉis, venigis novajn kaj novajn knabinojn kaj sin okupis, oni diras, per la administrado de la nomesoj, sed li komprenis nenion, absolute nenion. Sed plej malbone estas, ke li kuniĝis kun Fenicianoj, bankrotintaj nobeluloj kaj diversaj perfiduloj, kiuj puŝas lin al la pereco...

–Kaj la venko apud Sodaj Lagoj..? –demandis Pentuer.

–Mi ne neas lian energion kaj liajn konojn de la milita arto respondis Herhor. –Tio estas la sola afero, kiun li scias. Sed diru vi mem, ĉu li gajnintus la batalon apud Sodaj Lagoj, sen via helpo, sen la helpo de la aliaj pastroj..? Mi ja scias, ke vi komunikis al li detalojn pri ĉiu movo de la libia bando... Kaj nun pensu, ĉu Ramzes eĉ kun via helpo, povus gajni batalon, ekzemple, kontraŭ Nitager..? Nitager estas majstro, Ramzes estas nur metia lernanto.

–Per kio do finiĝas via malamo? –demandis Pentuer.

–Malamo..! –ripetis la ĉefpastro. –Ĉu mi povas malami flavbekulon, kiu cetere estas tiel ĉirkaŭita de ĉiuj flankoj, kiel cervo de ĉasistoj, en intermonto? Sed mi devas konfesi, ke lia regado estas tiel malutila por Egipto ke, se Ramzes havus fraton, aŭ se Nitager estus pli juna, ni jam forigus la nunan Faraonon...

–Kaj via ekscelenco fariĝus lia posteulo..! –eksplodis Pentuer.

Herhor ne ofendiĝis.

–Strange vi malsaĝiĝis, Pentuer –respondis li, levante la ŝultrojn –de l' tempo, kiam vi faras politikon je via propra konto. Kompreneble, se Faraono mankus, mi havus la devon fariĝi Faraono, kiel ĉefpastro de teba Amon kaj la estro de la plej alta pastra kolegio. Sed por kio? Ĉu jam de dekelko da jaroj mi ne posedas pli grandan povon ol la Faraonoj..? Aŭ ĉu hodiaŭ, mi, la forpelita ministro de la milito, ne faras en la ŝtato, kion mi opinias necesa..? La samaj ĉefpastroj, trezoristoj, juĝistoj, nomarĥoj, eĉ generaloj, kiuj nun evitas min, devas plenumi ĉiun sekretan ordonon de la plej alta kolegio, portanta mian sigelon..? Ĉu vi mem kuraĝus kontraŭstari al ili..?

Pentuer mallevis la kapon. Se malgraŭ la morto de Ramzes XII ne malaperis la plej alta sekreta pastra kolegio, Ramzes XIII devas aŭ cedi al ĝi, aŭ konduki kontraŭ ĝi mortan batalon.

La Faraono havis ĉe sia flanko la tutan popolon, la tutan armeon, multe da pastroj kaj la plimulton de la civilaj altranguloj. La kolegio povis kalkuli apenaŭ lun kelke da miloj da partianoj, je siaj trezoroj kaj je sia senfine saĝa organizo. La fortoj estis tute neegalaj, sed la rezultato de la batalo tre duba.

–Vi do decidis pereigi la Faraonon..! –murmuretis Pentuer.

–Tute ne. Ni nur volas savi la ŝtaton.

–En tia okazo kion devas fari Ramzes XIII..?

–Kion li faros..? mi ne scias –respondis Herhor. –Sed mi scias, kion faris lia patro. Ramzes XII ankaŭ komencis la regadon per ignoranteco kaj despotismo; sed kiam la mono mankis al li, kaj la plej fervoraj partianoj komencis lin malŝati, li sin turnis al la dioj. Li ĉirkaŭis sin per pastroj, lernis de ili, eĉ edziĝis kun la filino de la ĉefpastro, de Amenhotep... Kaj post dekelko da jaroj li sukcesis fariĝi ĉefpastro ne sole pia, sed eĉ tre saĝa.

–Kaj se la Faraono ne obeos ĉi tiun konsilon?

–Ni ekzistos sen li –diris Herhor.

Post momento li daŭrigis:

–Aŭskultu min, Pentuer. Mi scias ĉion, kion faras, eĉ kion pensas via Faraono, kiu cetere ne estas ankoraŭ solene kronita, estas do nenio por ni. Mi scias, ke li volas fari la pastrojn siaj servistoj, kaj sin la sola estro de Egipto. Sed tia intenco estas malsaĝaĵo, eĉ perfido. Ne la Faraonoj, vi scias tion tre bone, kreis Egipton, sed la dioj kaj pastroj. Ne la Faraonoj mezuras la leviĝon de Nilo kaj reguligas ilin; ne la Faraonoj instruas la popolon semi, rikolti, eduki brutojn. Ne la Faraonoj resanigas la malsanojn de la loĝantoj kaj gardas la sendanĝeron de la ŝtato kontraŭ la eksteraj malamikoj. Kio do okazus, diru mem, se la pastraro donus Egipton al la fantazio de l' Faraonoj? La plej saĝa el ili havas sperton de kelkdeko de jaroj; sed la pastraro esploris kaj lernis dum dekoj da jarmiloj... La plej potenca monarĥo havas unu paron da okuloj kaj manoj; ni, ni posedas milojn da okuloj kaj manoj en ĉiuj nomoj kaj regnoj... Ĉu do la agado de la Faraono povas esti komparata kun la nia, kaj se la opinioj diferencas, kiu devas cedi, ni aŭ li..?

–Kion mi devas nun fari? –intermetis Pentuer.

–Faru, kion ordonas al vi ĉi tiu junulaĉo, kondiĉe ke vi ne perfidos la sanktajn misterojn. Kaj la ceteron... lasu al la tempo... Mi sincere deziras, ke la junulo, nomata Ramzes XIII, revenu sur la vojon de la prudento, kaj mi supozas, ke li tion farus, se... se li ne estus ligita kun abomenaj perfiduloj, super kiuj jam pendas la mano de l' dioj.

Pentuer adiaŭis la ĉefpastron, plena de malĝojaj antaŭsentoj; tamen li ne perdis la kuraĝon, sciante, ke kion ajn li akiros hodiaŭ por la plibonigo de la sorto de l' popolo, tio jam restos, eĉ se la Faraono sin klinus antaŭ la potenco de l' pastroj.

"En la plej malbona situacio –pensis li –ni faru, kion ni povas kaj devas. Iam la rilatoj pliboniĝos, kaj la nuna semo donos fruktojn."

Tamen li decidis forlasi la propagandon inter la popolo. Kontraŭe li estis preta trankviligi la malpaciencajn, por ke ili ne pligrandigu la embarasojn de l' Faraono.

Post kelke da semajnoj Pentuer penetris en la limojn de Malsupra Egipto, serĉante survoje plej prudentajn kamparanojn kaj metiistojn, el kiuj oni povus elekti delegitojn por la kunveno, kiun kunvokis la Faraono. Ĉie dum la vojaĝo li trovis signojn de granda ekscito: kamparanoj kaj metiistoj postulis, ke oni donu al ili ripozon ĉiun sepan tagon kaj pagu por ĉiuj publikaj laboroj, kiel estis iam. Kaj nur dank' al la admonoj de l' pastroj de diversaj temploj ne eksplodis ĝenerala ribelo, aŭ almenaŭ oni ne interrompis la laborojn.

Samtempe li rimarkis kun miro kelkajn novajn fenomenojn, kiujn li ne vidis antaŭ unu monato.

Unue, la popolo sin dividis en du partiojn. Unuj estis partianoj de la Faraono kaj malamikoj de l' pastroj, aliaj indignis kontraŭ Fenicianoj. Unuj pretendis, ke la pastroj devas liveri al la Faraono la trezorojn de Labirinto, aliaj murmuretis, ke la Faraono tro protektas la fremdulojn.

Sed plej stranga estis la famo, kiu venis oni ne scias de kie, ke Ramzes XIII montras simptomojn de la frenezo..! Same kiel lia pli aĝa sampatra frato, kiun pro la sama kaŭzo oni forigis de la trono. Pri ĉi tiu famo parolis la pastroj, skribistoj, eĉ kamparanoj.

–Kiu rakontas al vi tiajn mensogojn..? –demandis Pentuer sian konaton inĝenieron.

Tio ne estas mensogo —respondis la inĝeniero —sed malĝoja vero... En la teĉaj palacoj oni vidis la Faraonon tute nudan, kurantan en la ĝardenoj. Foje nokte Lia Santeco, sub la fenestro de reĝino Nikotris, suriris la arbon kaj parolis kun si mem.

Pentuer certigis lin, ke antaŭ du semajnoj li vidis la Faraonon, kiu ĝuas bonan sanon. Sed li tuj rimarkis, ke la inĝeniero ne kredas al li.

"Tio estas afero de Herhor..! —pensis li. —Cetere nur la pastroj povus havi tiel rapide novaĵojn de Teboj..."

Por unu momento li tute perdis la deziron elekti la delegitojn, sed baldaŭ li reakiris la energion, ĉiam ripetante al si, ke kion la popolo ricevos hodiaŭ, ĝi ne povas perdi morgaŭ... Se nur ne okazos io, eksterordinara..!

Apud Memfiso, norde de la piramidoj kaj Sfinkso, jam sur la limo de la sabloj, estis malgranda templo de la diino Nut. Tie loĝis maljuna pastro Menes, inĝeniero, la plej granda astronomo de Egipto.

Kiam en la ŝtato oni faris grandan konstruaĵon aŭ novan kanalon, Menes iris al la loko kaj desegnis la planon. Ekster tiaj okazoj li vivis malriĉa kaj sola en sia templo, nokte observante la stelojn, tage laborante ĉe strangaj aparatoj.

De kelke da jaroj Pentuer ne estis en tiu loko, kaj nun malagrabla impresis lin ĝia mizero kaj izoleco. La brika baro disfaladis, en la ĝardeno sekiĝis la arboj, en la korto vagis malgrasa kaprino kaj kelke da kokinoj.

Apud la templo estis neniu. Nur kiam Pentuer komencis voki, el la pilono eliris maljuna homo. Li havis nudajn piedojn, sur la kapo malpuran kufon, kiel la kamparanoj, ĉirkaŭ la koksoj ĉifonan zonon, kaj sur la dorso panteran felon, kiu perdis la harojn. Malgraŭ tio lia eksteraĵo estis plena de memrespekto kaj lia vizaĝo de inteligenteco.

Li fikse rigardis la gaston kaj diris:

—Aŭ mi eraras, aŭ vi estas Pentuer?

—Vere mi estas Pentuer —diris la veninto kaj kore ĉirkaŭprenis la maljunulon.

—Ho! Ho..! —ekkriis Menes (tio estis li). —Mi vidas, ke vi ŝanĝiĝis sur la reĝaj plankoj. Vi havas glatan haŭton, pli blankajn manojn kaj oran

ĉenon sur la kolo. Tiajn ornamojn longe devus atendi la diino de la ĉiela oceano, la patrino Nut..!

Pentuer volis demeti la ĉenon; sed Menes haltigis lin kun rideto.

–Lasu –diris li: –Se vi scius, kiajn juvelojn ni havas sur la ĉielo, vi ne rapidus oferi oron... Do vi venas loĝiĝi ĉe ni..?

Pentuer skuis la kapon.

–Ne –respondis li, –Mi venas nur por saluti vin, dia majstro.

–Kaj poste ree al la kortego..? –ridis la maljunulo. –Ho vi, vi..! se vi scius, kion vi perdas forlasante la saĝon por la palacoj, vi estus la plej malfeliĉaj homoj...

–Ĉu vi estas sola, majstro?

–Kvazaŭ palmo en la dezerto, precipe hodiaŭ, kiam mia surdemuta iris kun korbo Memfison almozpeti ion por la patrino de Ra kaj por ŝia pastro.

–Tio ne tedas vin..?

–Min..? –ekkriis Menes. –Dum la tempo, kiam mi vin ne vidis, mi forŝiris de la dioj kelke da misteroj, kiujn mi ne ŝanĝus je la du kronoj de Egipto.

–Ĉu tio estas sekreto..? –demandis Pentuer.

–Kia sekreto..! Antaŭ unu jaro mi finis la mezuradon kaj kalkulojn pri la grandeco de la tero...

–Kion tio signifas?

–Vi ja scias, ke la tero ne estas ebena, kiel tablo, sed ke ĝi estas grandega globo, sur kies supraĵo troviĝas la maroj, landoj kaj urboj...

–Tio estas konata –diris Pentuer.

–Ne de ĉiuj –respondis Menes. –Sed jen kio tute ne estis konata: kiel granda estas la globo?

–Kaj vi scias? –demandis Pentuer preskaŭ timigita.

–Mi scias. Nia infanterio marŝas dum unu tago ĉirkaŭ dek tri egiptajn mejlojn [Tri geografiaj mejloj] . La tera globo estas tiel grandega, ke niaj soldatoj farus la plenan ĉirkaŭiron dum kvin jaroj...

–Dioj..! –ekkriis Pentuer. –Ĉu vi ne timas, patro, pensi pri tiaj aferoj...

Menes levis la ŝultrojn.

– Mezuri la grandon de piramido aŭ de la tero estas tute la sama afero. Mi faris pli malfacilajn aferojn, ĉar mi sukcesis mezuri la interspacon inter mia templo kaj la palaco de l' Faraono, ne transirante Nilon...

– Terure..! – murmuretis Pentuer.

– Kia teruro..? Sed mi malkovris aferon, kiun vere vi ĉiuj timos... Sed pri tio parolu al neni. En la monato Paofi ni havos mallumiĝon de la suno... tage fariĝos nokte... Kaj mi mortu de malsato, se en miaj kalkuloj mi eraris nur je la dudekono de unu horo.

Pentuer tuŝis la amuleton, kiun li havis sur la brusto kaj diris preĝon. Poste li demandis:

– Mi legis en la sanktaj libroj, ke jam multfoje, por turmenti la homojn, tagmeze fariĝis nokto. Sed kio tio estas? Mi ne komprenas.

– Ĉu vi vidas la piramidojn? – demandis subite Menes, montrante al la dezerto.

– Mi vidas.

– Kaj nun metu vian manon antaŭ la okuloj... Ĉu vi vidas la piramidojn? Vi ne vidas. La mallumiĝo de la suno estas sama afero: inter la suno kaj ni sin metas la luno, kovras la patron de la lumo kaj faras nokton...

– Kaj tio ĉi okazos ĉe ni? – demandis Pentuer.

– En la monato Paofi. Mi jam skribis pri tio al la Faraono, pensante, ke rekompence li sendos oferon al nia malzorgata templo. Sed li, leginte la leteron, ridis min kaj ordonis al mia sendito doni la leteron al Herhor...

– Kaj Herhor?

– Li donis al ni tridek mezurojn da hordeo. Li estas la sola homo en Egipto, kiu respektas la saĝon; la juna Faraono estas senpripensa.

– Ne estu severa por li, patro – intermetis Pentuer. – Ramzes XIII volas plibonigi la sorton de la kamparanoj kaj metiistoj; li donos al ili ripozon ĉiun sepan tagon, malpermesos bati ilin sen juĝo, eble donacos al ili teron...

– Kaj mi diras al vi, ke li estas senpripensa – respondis la incitita Menes. – Antaŭ du monatoj mi sendis al li grandan planon por plifaciligi la laboron de l' kamparanoj, kaj... li ankaŭ mokis min..! Li estas ignoranto kaj malhumilulo.

– Patro, vi antaŭjuĝas... Sed diru al mi vian planon, kaj eble mi helpos

plenumi ĝin.

–Plano..! –ripetis la maljunulo. –Tio ne estas plu plano, sed realaĵo...

Li leviĝis de la benko kaj ili ambaŭ iris al la lageto de la ĝardeno, apud kiu staris laŭbo, perfekte kovrita de grim pantaj kreskaĵoj. En la laŭbo troviĝis granda rado, metita sur horizontala akso, kun multo da malgrandaj siteloj sur la ĉirkaŭo. Menes eniris en la internon de la rado kaj komencis movi ĝin per la piedoj; la rado turniĝis, la siteloj ĉerpis la akvon el la lageto kaj verŝis ĝin en trogon, metitan pli alte.

–Interesa aparato! –diris Pentuer.

–Kaj ĉu vi divenos, kion ĝi povas fari por la egipta popolo?

–Ne.

–Imagu do, ke la rado estas kvin aŭ dek fojojn pli granda, kaj ke en ĝia interno, anstataŭ homo, paŝas kelke da paroj da bovoj...

–Io... io ŝajnas al mi –intermetis Pentuer –sed mi ne komprenas ankoraŭ bone.

–Tio estas tiel simpla! –respondis Menes. Per la helpo de ĉi tiu rado, bovoj aŭ ĉevaloj povus ĉerpi akvon el Nilo kaj verŝi ĝin en pli kaj pli suprajn kanalojn... kaj tiamaniere la dumiliono da homoj, kiuj hodiaŭ laboras ĉe la siteloj, povus ripozi... Nun vi vidas, ke la saĝo donas pli da feliĉo al la homoj, ol la Faraonoj.

Pentuer skuis la kapon.

–Kiom da ligno oni bezonus por tio! –diris li –kiom da bovoj, da paŝtaĵo..! Ŝajnas al mi, patro, ke via rado ne anstataŭos la sepan tagon de ripozo.

–Mi vidas –respondis Menes, levante la ŝultrojn –ke la rangoj ne alportis al vi utilon. Sed kvankam vi perdis la sagacecon, kiun mi admiris en vi, mi montros al vi ankoraŭ ion... Eble iam vi revenos al la scienco, kaj kiam mi mortos, vi volos labori por pliperfektigi kaj diskonigi miajn eltrovojn.

Ili revenis al la pilono, kaj Menes metis iom da ligno sub kupran kaldronon. Li blovis sur la flamojn kaj baldaŭ la akvo komencis boli.

El la kaldrono elstaris vertikala tubo, kovrita per peza ŝtono. Kiam la akvo eksiblis en la kaldrono, Menes diris:

–Stariĝu ĉi tie kaj rigardu...

Li ekmovis turnilon, aligitan al la tubo kaj subite la peza ŝtono estis ĵetita supren, kaj la ĉambro pleniĝis per kolonoj de varmega vaporo...

–Mirindaĵo! –ekkriis Pentuer.

Sed tuj li trankviliĝis kaj demandis:

- Kaj ĉi tiu ŝtono, kiel ĝi plibonigos la sorton de la popolo?
- La ŝtono neniel –respondis la saĝulo, jam malpacienca. –Sed vere, mi diras al vi kaj tion memoru: venos tago, ke la ĉevalo kaj bovo anstataŭos la homan laboron, kaj la bolanta akvo anstataŭos la ĉevalon kaj bovon.
- Sed kian profiton la kamparanoj havos de tio? –insistis Pentuer.
- Ve al mi! –ekkriis Menes, kaptante sin je la kapo. –Mi ne scias, ĉu vi maljuniĝis aŭ malsaĝiĝis, sed la kamparanoj kovris al vi la tutan mondon, vualis vian inteligenton. Se la saĝuloj atentus nur la kamparanojn, ili devus ĵeti for siajn librojn kaj kalkulojn kaj fariĝi paŝtistoj...
- Ĉiu afero devas alporti utilon –intermetis nekuraĝe Pentuer...
- Vi kortegaj homoj –diris Menes maldolĉe –ofte uzas du mezurojn! Se Feniciano alportas al vi rubenon aŭ safiron, vi ne demandas: kia estas la profito de ili? sed vi aĉetas la ŝtonon kaj ŝlosas ĝin en kesto. Sed kiam saĝulo venas al vi kun eltrovo, kiu povus ŝanĝi la aspekton de la mondo, vi tuj demandas: kia estas la profito de ĝi..? Sendube timo ekregas vin, ke la esploranto de la naturo postulos plenmanon da hordeo por la objekto, kiun ne komprenas via animo.
- Vi koleras, patro..? Ĉu mi volis ĉagreni vin..?
- Mi ne koleras, sed bedaŭras. Ankoraŭ antaŭ dudek jaroj ni estis en la templo kvin, laborantaj por malkovri la misterojn de la naturo. Hodiaŭ mi restis sola kaj pro dioj! mi ne povas trovi ne sole posteulon, sed eĉ homon, kiu komprenus min.
- Certe, patro, mi restus ĉi tie ĝis la morto, por ekkoni viajn diajn projektojn –respondis Pentuer. –Sed diru, ĉu mi povas hodiaŭ ŝlosi min en templo, kiam estas pesata la sorto de la ŝtato, la feliĉo de la simpla popolo kaj kiam mia rolo...
- Povas influi la sorton de la lando kaj de kelke da milionoj da kamparanoj..? –interrompis moke Menes. –Ho vi, plenaĝaj infanoj en tiaroj kaj ĉenoj de altranguloj! Ĉar permesite estas al vi ĉerpi akvon el Nilo, tuj ŝajnas al vi, ke vi povas haltigi la leviĝon aŭ malleviĝon de la rivero. Vere, ne alie pensas ŝafino, kiu sekvante la aron, imagas, ke ŝi kondukas ĝin.
- Sed pripensu, majstro. La juna Faraono havas koron plenan de nobleco, li volas doni al la popolo ripozon ĉiun sepan tagon, justan juĝadon, eĉ teron...

Menes skuis la kapon.

- Ĉio ĉi –diris li –estas vantaj aferoj. La junaj Faraonoj maljuniĝas, kaj la popolo... la popolo havis jam multfoje ripozon ĉiun sepan tagon, kaj poste perdis ĝin... Ah, se nur tio ŝanĝiĝus! Kiom da dinastioj kaj pastroj pasis en Egipto de tri mil jaroj, kiom da urboj kaj temploj disfalis en ruinojn, eĉ novaj tavoloj de tero formiĝis.

Ĉio ŝanĝiĝis ekster tio, ke du kaj du estas kvar, ke triangulo estas duono de kvarangulo, ke la luno povas kovri la sunon, kaj ke la bolanta akvo povas ĵeti supren ŝtonon... En ĉi tiu pereema mondo daŭras kaj restas nur la saĝo. Ve al tiu, kiu por aferoj pasantaj, kiel la nuboj, forlasas la eternajn! Lia koro neniam ĝuos trankvilon, lia animo balanciĝos, kiel ŝipeto dum ventego.

–La dioj parolas per via buŝo, majstro –respondis Pentuer post pripenso –sed apenaŭ unu homo el la milionoj povas fariĝi ilia instrumento... Kaj tio estas bona. Ĉar kio okazus, se la kamparanoj tutajn noktojn rigardus la stelojn, la soldatoj farus kalkulojn, la altranguloj kaj Faraono, anstataŭ regi, ĵetus ŝtonojn per la helpo de bolanta akvo? Antaŭ kiam la luno unu fojon ĉirkaŭirus la teron, ĉiuj devus morti de la malsato... Fine, neniu rado, neniu kaldrono defendus la landon kontraŭ la atako de la barbaroj, nek disdonus la juston al la plendantoj. Do –konkludis Pentuer –kvankam la saĝo estas kvazaŭ la suno, sango kaj spiro, ni ne povas ĉiuj esti saĝuloj.

Al tiuj vortoj Menes respondis plu nenion.

Kelke da tagoj pasigis Pentuer en la templo de la dia Nut, rigardante kun plezuro jen la sablan maron, jen la fruktodonan valon de Nilo. Kun Menes li observis la stelojn, rigardis la radon por la ĉerpado de akvo, iafoje promenis al la piramidoj. Li admiris la simplecon kaj genion de sia majstro, sed en la animo li pensis:

"Menes estas sendube dio, enkorpigita en homa figuro, kaj tial li ne zorgas pri la surtera vivo. Lia rado por ĉerpi la akvon ne estos akceptita en Egipto, ĉar unue ligno mankas al ni, kaj due por movi tiajn radojn oni bezonus centon da miloj da bovoj, kaj kie trovi por ili la paŝtaĵon, eĉ en Supra Egipto..?"



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels112.pdf>

Numero 112^a - Januaron 2020



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88